# Nova sidejo de A.E.A.



Laŭ decido de la **Katedro Jovellanos pri Universitata Disvastigo**, en kiu estas enkadrigita nia esperantista Asocio, la sidejo de nia E-grupo estis ŝanĝita lasttempe. La nova ejo de **Astura Esperanta Asocio** troviĝas en la Universitata Areo (Kampuso) de Vieskes, konkrete, en tiu konstruaĵo nomata "Norda Aŭlaro". Oni eksplikas ĉi tie la manieron alveni al tiu loko.






La apuda bildo prezentas la konstruaĵojn de ambaŭ Aŭlaroj, la Norda kaj la Suda, kaj utilas por vidi la itineron ekde la buso-haltejo ĝis la enirejo plej proksima al la loko kie troviĝas nia ejo. La bus-haltejo nomiĝas "Aularios" (en la hispana lingvo) kaj apartenas al la 18-a bus-linio de Gijón. Por iri ekde tiu loko al la enirejo de nia sidejo sufiĉas transiri la ŝoseon kaj iri bordigante maldekstren la eksteraĵon de ambaŭ Aŭlaroj ĝis la lasta pordo (maldekstre) de la "Norda Aularo".

La enirejo plej proksima al nia ejo en la konstruaĵo, (kiun oni povas vidi en la apuda fotografaĵo) estas la lasta en la kurba muro de la domo, se oni aliris tien tra la ekstera parto de la konstruaĵo. Sed oni povas adresiĝi al tiu loko ankaŭ tra la interno de la domo, tio estas, irante laŭlonge de la kurba koridoro ĝis la fino de tiu pasejo, kie troviĝas la ĉambro destinita al nia Asocio.






Fine de la kurba koridoro, se oni iris tien tra tiu vojo, aŭ fronte al la pordo, se oni venis de ekstere, troviĝas la ejo asignita al nia E-Asocio, kiu aperas en la apuda bildo. La enirejo estas en la flanka koridoro. La adreso de tiu loko estas:
**Asociación Asturiana de Esperanto**
**Aulario Norte.**
**Campus de Viesques (33203-GIJÓN)**

Apude aperas bildo de la interno de tiu ejo. Ĝi estas sufiĉe komforta loko, sed, malfeliĉe, ĝi ne estas tiel ampleksa kiel la antaŭa loko, je kiu ni disponis ĝis nun en la centro de la urbo.
Pri tiu loko de nia sidejo kaj la maniero alveni tien estas plia informo en nia retpaĝo, adreso:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/ejo/ejo.htm

